

Numero 42

FAMILIA ESPERANTO n-ro 09 (2/2003)



FAMILIA ESPERANTO

**NEREGULA CIRKULAĴO
DE RONDO FAMILIA**



ELDONAS: RONDO FAMILIA DE UEA

EDITORIA ANGULO

385 en 52

Temas pri 385 adresoj en 52 landoj, al kiuj estis sendita la lasta numero (1/03) de FAMILIA ESPERANTO. Dank' al Árpád Rátkaĵ mi povas al vi prezenti eĉ la FE-densecon de la unuopaj landoj, kio multe influas la ĝeneralan bildon kreatan el nur abon-ciferoj.

Jen la landoj kun la plej granda nombro de FE-ricevantoj:

lando	abonantoj	loĝantaro en milionoj	FE-denseco
1. Germanio	55	80	0,69
2. Francio	45	57	0,79
3. Hungario	25	10	2,50
4. Rusio	21	148	0,14
5. Belgio	19	10	1,90
Pollando	19	38	0,50
6. Nederlando	17	15	1,13
7. Brazilo	15	159	0,09
9. Usono	14	258	0,05

Kompare kun la stato antaŭ tri jaroj, la adresaro kreskis je preskaŭ cent "novuloj" kaj mi certas, ke estas ankoraŭ multaj "familianoj", kiuj tute ne aŭdis pri FE. Se vi konas tiajn, bonvolu pludoni la informon pri la eblo ricevadi nian eldonaĵon. La plej simpla maniero aldoniĝi al nia rondo estas mesaĝi al mi al la ret-adreso: <cind@co.uea.org>.

Mi atendas viajn vivsignojn.

Amike,

Katarina



ESPERANTA FAMILIO EN FAMILIA ESPERANTO

La familio BRANDENBURG el Germanio

Ĉu utilis prezenti nin en la nuna cirkulaĵo? Sincere, mi dubas, ke mi sukcesus skribigi la familianojn pri la ĉiutago siatempe. Por ili estis Esperanto simple "nia lingvo"! La patro parolis ĝin ekskluzive, la patrino aŭdis ĝin kaj aplikis ĝin same - nature - ĉe la tria infano.

Judith naskiĝis en 1960, ŝiaj fratoj Guido en 1952 kaj Ulriko en 1950.

Esperanto restis "nia lingvo" inter ni kvin.

Ulriko, edzo de Barbara (kiu eldonis LA ABC DE LA BESTOJ), konatiĝis kun

ŝi dum IS. Mi menciis, ke ambaŭ preskaŭ ĉiujare partoprenas la HDP-aranĝon (IF). La genepoj, Jens, 22-jara, kaj Heike, 19-jara, komprenas nian lingvon, kvankam ili obstine respondas en la germana.

Guido ne daŭrigis la tradicion. Liaj edzino Martina kaj filino Anne restis germanligvanoj.

Kaj Judith parolas kun sia 4-jara Sonja la italan. Judith laboras en hamburga itala kultur-instituto kaj deziras sian ĉiutagan lingvon tuj transdoni al la etulino. Kiam ni estas ĉiuj kune, dekduope, ni saltas de lingvo al lingvo, nur la anglan ni obstine neglektas. Lastjare ni estis kune sur la insulo Fo"hr. Willi fariĝis 80-jara.

Niaj infanoj nur profitis el sia lingvoscio. Ĉiuj parolas plurajn lingvojn, Ulriko eĉ 8 aŭ 10. La ekonomia situacio estas nun pli facila. Junaj familioj povas vojaĝi al familiaj renkontiĝoj, ne nepre nur dum la jarfino. Kiom da belaj infanlibroj ekzistas intertempe! Siatempe s-ro Eichholz organizis engluadon de E-tekstoj en kanadajn bildlibrojn. Kiel primitive! La Brandenburg-gepatroj fieras pri la eltrovo de la PUŜCIKLO. Tiaj ĝojigis niajn knabojn antaŭ 46 jaroj, sed mankis por ili la vorto.

Margret Brandenburg



LINGVA ANGULO

La deveno de “edzo” - vera unikaĵo

La plej multaj vortoj en Esperanto devenas de latinidaj lingvoj. Ankaŭ multaj vortoj devenas de ĝermanaj kaj slavaj lingvoj. Nur malmultaj vortoj estas vere artefaritaj.

Unu vorto, kiu fakte estas artefarita, aŭ kiu ekestis en nekutima maniero estas “edzo”. En OFICIALA GAZETO, dec.1913, ni povas legi: “En la germana lingvo, reĝido, heredonto de la krono, estas nomata Kronprinzo, kiu fariĝas en Esperanto kronprinco. La virino kunigita kun la kronprinco per leĝa ligilo estas nomata germane Kronprinzessin. Ĉi tiun lastan vorton D-ro Zamenhof transskribis Esperante ‘kronprincezino’ kaj li tuj rimarkis, ke la finaĵo de tiu vorto, t.e. ‘edzino’, ricevis per si mem la sencon de virino kunigita al viro per leĝa ligilo. Li do faris el ĉi tiu vorto: unue, generalan sufikson, esprimantan difinitan rilaton, kaj due, vorton memstaran kun tiu sama signifo. Poste el la vorto edzino li tute logike devenigis la vorton ‘edzo’.


El: *La Espero* 03/1

Ĉu vi scias, ke ...



bojas
boj

miaŭas
miaŭ



beas
be-e-e



kvakas
kvak



henas
hen



pepas



roras
ror



ululas
hu-hu



kriĉas
kriĉ



hurlas

La sonojn de la bestoj en 36 lingvoj (ankaŭ en Esperanto) serĉu ĉe:
<http://www.georgetown.edu/faculty/ballc/animals/animals.html>

IRU NI AL ...

20-a Internacia Festivalo (IF) 27. decembro 2003 - 3. januaro 2004 en Kiel (norda Germanio). Kadra temo: Rusio. Jubilea rabato: 10 eŭroj kaj sen kotizo-altiĝo en 2003. Jubilea vespero kun ŝaŭmvina akcepto kaj granda tombolo (la 1-a premio estas senkosta IF-partopreno). Eblo uzi rabatitajn trajnbiletojn en Germanio (vi pagus po 6 eŭrojn por persono). Subvencioj kaj stipendioj por lingve spertaj aliĝintoj el nepagipovaj kaj reformaj landoj.

2a "Novjara Renkontiĝo" (NR) en Tecklenburg apud Münster:

"Komune festi la Novan Jaron!"

28a de decembro 2003 ĝis 2a de januaro 2004 kun ebleco de plilongigo.

Oficiale ni havas nur kvin tranoktojn, de dimanĉo la 28a de decembro, ĝis vendredo la 2a de januaro. Eble kelkaj el vi ŝatos resti kun ni unu aŭ du tagojn pli longe en la komenco aŭ en la fino - tio eblus favorpreze en iom malpli granda rondo. Depende de viaj proponoj ni ofertas programon ankaŭ por tiuj tagoj.

La renkontiĝo ĉefe direktiĝas al Esperanto-parolantoj. Kompreneble kunuloj kaj infanoj estos bonvenaj ankaŭ sen kono de Esperanto.

Ni ĉefe volas pasigi kelkajn agrablajn tagojn kaj havi multan lokon por neformalaj interparoloj. Ni ĝuos promenojn kaj vesperan programon. Ni amuzos niajn infanojn kaj ili nin. Ni proponos prelegojn kaj diskutrondojn - pasintjare estis dekkvino da ili. Ne estos ĝenerala temo, sed ni ja intencas proponi al vi kelkajn prelegojn kaj kursojn unuflanke pri komunikado kaj laborteknikoj kaj aliflanke pri saneco kaj nutrado. Se vi havas aldonan deziron pri la programo: kontaktu nin, ni volonte pripensas la programon kun vi.

Eblas partopreni kiel memzorganto; la organizado de eventuala memzorgejo dependos de frua aliĝo de la interesatoj.

Kotizoj: La unua aliĝperiodo daŭris ĝis la 31a de julio. La prezoj nun varias inter 0 eŭroj por beboj tra pluraj ŝtupoj ĝis 205 eŭroj por homoj ekde 27 jaroj. Estas rabatoj por eksterlande loĝantoj, por programkontribuantoj kaj helpantoj kaj krome por la donacantoj kaj kunlaborantoj de Esperantoland laŭ interkonsento.

Aliĝo: - rete: www.Esperantoland.org/nr - aŭ sendu retmesaĝon aŭ leteron al Esperantoland e. V.

Lu Wunsch-Rolshoven

Wiciefstr. 9

DE-10551 Berlin

Germanio

Lu@Esperantoland.org

telefono +49-30-685 58 31

En la reto ĉe www.Esperantoland.org/nr cetere troviĝas ankaŭ kelkaj fotoj de la unua NR kaj listo kun kelkaj pasintjaraj partoprenantoj.

Amike - Lu Wunsch-Rolshoven

KRIZA MOMENTO

Kiam nia filo David naskiĝis en 1979, mia edzino kaj mi interkonsentis, ke ŝi ĉiam parolos kun li angle kaj mi ĉiam esperante. La rezulto estis tute kontentiga: la knabeto bone distingis inter la lingvo de Panjo kaj tiu de Paĉjo kaj estis plene dulingva ekde la komenco.

Sed oni avertis min, ke iam venos kriza momento rilate lian uzon de Esperanto. Infano, kiu parolas lingvon tute fremdan al sia medio, iam volos konformiĝi al tiu medio kaj ne esti esceptulo: eble ĝi eĉ rifuzos paroli la elstarigan lingvon.

Kaj efektive la momento venis, kiam ni transloĝiĝis al nova kvartalo kaj strato. David estis kvarjara, la plej juna infano en strato, kie svarmis junaj knaboj kaj knabinoj ofte ludantaj grupope. Lun vesperon David venis al mi kaj petis, "Paĉjo, ne parolu al mi en Esperanto. Ili diras al mi 'salami salami salami' kaj ridas pri mi!" Mia etulo estis tre konsternita, kaj mi ne sciis kiel reagi. Provizore mi evitis respondon pri tio kaj paroligis lin pri alia temo (en Esperanto, kompreneble). Tamen mi pripensis.

La postan tagon David iris kiel kutime ludi kun amaso da infanoj. Mi atendis iom kaj poste aperis sur la strato kaj kriis en Esperanto: "Se vi volas ricevi bombonon, venu al mi."

Ĉiuj turnis sin al David kaj demandis, kion mi diras. Li interpretis, kaj unu post alia la infanoj venis al mi ricevi bombonon. David instruis al ili, ke oni diras "dankon", kaj mi liberigis ĉiun bombonon nur post ricevo de la dankvorto. Silente mi reiris en nian domon.

La postan tagon mi agis simile: "Se vi volas pecon da ĉokolado, venu al mi." "David, kion li diras?" la aliaj volis scii. Fiere David klarigis, kaj formiĝis vico da infanoj, kiuj diris Esperante "dankon" kaj ricevis kvadrateton da ĉokolado. Poste mi refoje foriris sen diri eĉ unu vorton.

La taktiko estis tute sukcesa. La ceteraj komprenis, ke estas avantaĝe, ke David povas peri inter ili kaj la strangalingva viro, kiu tamen donas belajn donacetojn. Siaflanke David fieris pri sia rolo.

Li neniam plu hezitis paroli al mi Esperante.

Trevor Steele

TAPORI

Tapori estas infan-movado tutmonda. Ĝi strebas al egalaj ŝancoj por ĉiuj infanoj.

La nomo "Tapori" estis elektita de Pastro Josef Wresinski, fondinto de la movado ATD Quart Monde, kiel signo de solidareco kun la plej malriĉaj infanoj. Dum sia infanaĝo Josef Wresinski kaj lia familio vivis en ega malriĉo. Li iĝis pastro kaj kuniĝis al mizeraj familioj en gastiga barakejo de la urbo Noisy-le-Grand (Francio).

En 1965, okaze de vojaĝo, en Hindio li renkontas infanojn, kiuj vivas en stacidomo. Oni nomas ilin "Tapori".

Reveninte al Francio li skribis al la infanoj de li protektataj: "Mi ofte rememoras pri tiuj infanoj tiom senhelpaj sed tiom kuraĝaj. Ili ne nur kapablas elturniĝi, sed ankaŭ helpi unu la alian. Ankaŭ ni povus esti "Tapori"-oj, kiuj el preskaŭ nenio sukcesos konstrui mondon sen mizero."

Monata bulteno, la "Letero de Tapori", helpas al infanoj, iliaj familioj kaj amikoj pripensi komunan agadon. Kune ili organiziĝas por koni kaj diskonigi pri la tre malriĉaj infanoj.

Kelkajn monatojn antaŭ ol morti, Josef Wresinski konfidence diris al la infanoj:

"Vi, Tapori-oj, estas la ĉampionoj pri feliĉo."

Pliajn informojn pri Tapori liveras:

TAPORI - ATD Quart Monde
chemin Galiffe, 5
CH-1201 Genève

MAGDZIAK Agnieszka kaj Krzysztof
ATD Quart Monde
8 rue de Vaux à Epluches
FR-95540 Mery-sur-Oise

rete: krzagn@poczta.wp.pl

VIZITU

<http://www.krokodilo.de/vortaro/s/semaforo.html>



LIBROBRETO

John Ronald Reuel Tolkien en Esperanto

La mastro de l' ringoj konsistas el tri partoj:

- **Kunularo de l' Ringo**. En 1997 la eldonejo "Sezonoj" enmerkatis gian 2-an eldonon.

Prezo: 19,50

La epopeeca rakonto pri imagita mondo plenas je mistikaj, fabelaj figuroj. La entitola ringo portas minacon por la tuta mondo kaj la juna heroo devas detru magian ringon, kies ekzisto minacas la tutan mondon.

- **Du turegoj** estis eldonita en 1996.

Prezo: 19,50 eŭroj.

- **La reveno de la reĝo** aperis en 1997.

Prezo: 19,50 eŭroj.



Ĉiu parto de la trilogio estis tradukita de William Auld kaj eldonita de "Sezonoj".

La mirfabelo "**La Hobito aŭ tien kaj reen**", plia verko de Tolkien, estis tradukita de Chris Gledhill kaj William Auld (kantoj). Ĝi estis verkita antaŭ la trilogio, en Esperanto aperis en 2000.

Prezo: 15,00 eŭroj.

H.C.Andersen interrete

La konata usona esperantisto Don Harlow enretigis kelkajn esperantigitajn verkojn H. C. Andersen senditajn al li de Lars Kromann.

La poemojn vi trovos ĉe

<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/>

La fabelojn vi serĉu ĉe

[http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Noveloj/](http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Noveloj/Fabeloj_de_Andersen/)

[Fabeloj_de_Andersen/](http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Noveloj/Fabeloj_de_Andersen/).

Laŭ: Esperanto en Danio; jan. 2003

KION LEGI? Konsilas al vi Abir

Sur unu el la kovrilpaĝaj bildoj de ĉi revuo estas patro kun sia filo: konata esperantisto Probal Daŝgupta kaj la 12-jara Abir. Mi petis la filon konsili al ni, kion legu la juna E-generacio. Antaŭ lia respondo jen iom da informoj pri la juna viro laŭ la indikoj de lia paĉjo:

Abir-on ni nomas hejme Birbal. Ĉi-nomon havis la saĝa konsilisto de la Mugala imperiestro Akbar. Abir kaj Akbar ambaŭ naskiĝis la 23-an de novembro. La spritajn rakontojn pri Birbal li tre ŝatis kiam li estis malgranda knabo.

La patrino de Abir nomiĝas Malasree (Malosri). Ŝi instruas geografion en la sama mezlernejo, kie studas ŝia filo.

Abir scipovas bone la bengalan kaj la anglan, li funkcias facile en la hindia kaj Esperanto, iom malpli en la telugua (la ĉefa lingvo de la provinco Andhra Pradesh, en kies ĉefurbo Hajderabado ni loĝas kaj li naskiĝis). La hindia estas la respublika lingvo, kvankam parolata nur de unu triono de la civitanaro de la Respubliko de Barato. Ni ŝanĝis al Barato la Esperantan nomon de Hinda Unio por ke la fremduloj ĉesu erare pensi, ke la hindia estus iel ĝia sola lingvo.

La ĉefa hobbio de Abir estas nuntempe la komputila programado. Li avide gitaras kaj aŭskultegas rokmuzikon, ŝatas bicikli kaj sporti (fanatikulo pri futbalo kaj kriketo). Li lernas la baratan klasikan muzikon en la hindustana (nordbarata) tradicio kaj kolektas poŝtmarkojn kaj monerojn. Li avide legas en diversaj lingvoj. Kion?

Kelkajn el la tralegitaj libroj mi konsideras ne sufiĉe spicaj, iujn tre tre agrablaj. Al la unua kategorio mi metas *Avinjo* (Peter Haertling), *Winnie-la-Pu* (Milne) kaj *La Mirindaj Aventuroj de Metilernanto Hlapić* (Ivana Brlić-Mažuranić). La gigante delektaĵaj libroj estas *Kumeŭaŭa Filo de la Ĝangalo* (Tibor Sekelj) kaj *La Kamaradaro de Petro Nodeto* (Mato Lovrak). La agrabletaj libroj estas *Mi Estas Pele* (Pele) kaj *Poemo de Utnoa* (Abel Montagut).

Se vi estas tre tenera persono, bonvolu legi la unuajn. Se vi estas normala tipo, legu la agrabletajn librojn. Sed se vi estas maltenera tipo kiel mi, legu la gigante delektaĵajn tre tre agrablegajn librojn.

Cetere, ĉu iu jam tradukis la librojn pri Harry Potter en Esperanton? Se jes, aldonu tiujn al la agrableta kategorio.

Por la malteneraj tipoj mi rekomendus la Mastron de la Ringoj. Mi aŭdis, ke tiujn oni jam faris en Esperanto.

Kiu el vi ŝatus respondi al Abir?

Estus interese koni ankaŭ viajn spertojn pri la legindaĵoj...

EL LA FAMILIAJ ALBUMOJ

En Fĉ 2/02 vi povis legi pri la travivaĵoj de familio Sagbadjelou en la jaro 2001. Jen la letero de Kokou, la patro de la familio, pri la okazintaĵoj en 2002:

En 2002 la movoj de nia familio iris precipe al du decembraĵoj aranĝoj, kiuj okazis en loka klubo "Verda Mondo", alia en la urbo "Notse". Temas pri Zamenhof-festo (15.12.) kaj la 10-a Togolanda Ĉ-Kongreso (27.-30.12.).

Ĉwoe' - mia edzino - feste memoris sian naskiĝdatrevenon sammonate, kiel nia filino Alix. Adĵoa Alix lernas la franca. Ŝi estas ĉi-jare en la 3-a klaso. Ĉstante instruisto pri la franca (en elementa lernejo) mi helpas ŝin hejme, alparolante ŝin en la franca.

*Sur la maldekstra foto: **Alix** en sia okjariĝo antaŭ la pordo de sia klasĉambro en la lernejo (jan. 2003).*



*Sur la dekstra foto estas la 17-monata **Jogail**.*

Ŝia patro estas korea esperantisto CHOĈ Taesok, kiu jam dum kelkaj jaroj loĝas en Vilnius (Litovio). Post siaj studoj en Budapeŝto li reiris al Koreio kaj dum 3 jaroj laboris kiel ĝenerala sekretario de Korea Ĉ-Asocio.

Ĉn 2001 li edziĝis kaj eklaboris kiel televida korespondanto.

Jogail estas alparolata de sia patro koree, de la patrino litove. La gepatroj uzas inter si Esperanton.

La 19-a Internacia Festivalo en la akvokastelo Borken-Gemen

27.12.2002 - 3.1.2003

Travivi kelkajn tagojn en kastelo estas deziro, pri kiu oni revas estante infano. Ĉi-jare tiu revo plenumiĝis por la pli ol 200 ĉeestantoj de la 19-a IF.

Reprezentantojn havis 25 landoj.

La organizanto Hans-Dieter Platz surprizis la partoprenantojn per nova IF-kantaro kaj per kajero kun kuirreceptoj.

La kadra temo estis **“Religioj kaj konfliktoj”**. Oni parolis pri diversaj religioj kaj iliaj doktrinoj, pri la religiaj kutimoj de malsamaj popoloj, pri la historio kaj tradicio de multaj landoj.

Ĉiutage antaŭ matenmanĝo oni povis praktiki ĉigong-on aŭ ĉeesti matenan pregon. Elekti eblis inter prelegoj pri pra-astronomio en Sud-Ameriko, ĉina kaligrafio, INDA-dancado, bildlingvo Bliss, Esperanto-filatelo... Ne mankis konsiloj por komputilantoj, nek promenoj, nek tuttaga ekskurso kaj ne vespera amuzado. Koncertojn prezentis Kajto kaj SoloTronik. Ĉarma estis la koncerta prezento de “La eta princo” kaj multaj ĝuis la modernan muzikon de Eduardo Vargas.

La tradician Silvestran balon enkondukis majesta polonezo, sekvata de varia internacia vespero .

Se vi ankoraŭ ne scias kiel pasigi la venontan jarmfinon, akceptu la inviton al la nordgermana urbo Kiel, kie okazos la 20-a IF. Jam ekde nun invitas vin

Liba Gabalda

Internacia Infana Kongreseto 2003

20 kilometrojn for de Gotenburgo, en la sveda Lehrum, ĝuis la ĉi-jaran IIK 28 infanoj el 8 landoj. Zorgis pri ili 4 gvidantoj kaj 5-6 helpantoj (ĉeestantaj gepatroj de etaj partoprenantoj).

La apuda lago ebligis ĉiutagan naĝadon, la arbaro trezorserĉadon kaj promenojn, la futbaltereno sportajn olimpikojn.

La tuta grupo estis loĝigita en granda ligna domo, forlasata ankaŭ ekzemple okaze de la vizito de bestoĝardeno.

Pli ol duono de la infanoj estis bonaj aŭ tre bonaj E-parolantoj, la resto havis ŝancon al lingva perfektigo en la paroligaj kunestoj.

Dankon al la ĉef-gvidanto, **Stefan MacGill**, pro lia laboro.

HUMURO

Paro vizitas pentraj-ekspozicion. Subite la edzo haltas antaŭ pentraĵo, kiu prezentas lian edzinon tute nudan.

Ĉu vi povus klarigi al mi, kiam vi pozis por tiu aĉulo?

Neniam mi pozis! Li tutcerte pentris laŭmemore!

Etaj Petro kaj Anjo estas kune en la bankuvo. Anjo rimarkas ion ĉe sia frateto:

“Kio estas tio?” ŝi scivolas.

“Tio estas mia!” decidemas Petro.

“Ĉu mi povas ludi per ĝi?” demandas Anjo.


“Ne!” respondas Petro. “Ne tuŝu! Vidu, vi jam rompis la vian!”

Patrino staras antaŭ la spegulo en nova palto. La infaneto demandas:

- Ĉu paĉjo aĉetis ĝin por vi?

- Ho, mia karulineto, se mi esperintus ricevi ĝin de via paĉjo, ankaŭ vi ne estus naskiĝinta!

KORESPONDI DEZIRAS



⇒ Reta Korespond-servo:

Adreso de la retpaĝo de EKS:

<http://members.aol.com/enrike/ekspeo.htm> (listo, nur Esperanto)

Bonvolu legi la regulojn:

<http://members.aol.com/enrike/ekseo.htm>

Enrike@aol.com

⇒ Andriatiana Zivamalala, 16-jara.

Adreso: Lot. II.D. 57-ter, Manjakaray; MG-101 Antananarivo, Malagasio.

Pri la 19a PSI en Bonn (DE) serĉu fotojn ĉe

<http://www.esperanto.de/psi/2003> <http://www.esperanto.de/psi/2003>

Aldonindas la ĝojiga informo, ke la 19a PSI a) estis la plej granda ĝis nun

(pli ol 170 partoprenantoj) kaj b) havis aparte grandan nombron da infanoj kaj junuloj.

La fotojn pri la ĉi-jara Renkonto de E-istaj Familioj vi trovos ĉe:

<http://bertosch.free.fr/ref2003fotoj/ref2003fotoj.html>

GALERIO DE ESPERANTO-FAMILIOJ
<http://familioj.komputilo.org>

NOVAJ PAROJ

Unu jaron poste -

♥ Joel Brozovsky (Usono) kaj Leonora Gonzáles (Meksiko) [surfote], geedziĝis pasintjule en Meksiko. La juna paro pasigis la mielmonaton en Brazilo, kie ĝi partoprenis sian unuan Universalan Kongreson kiel familio. Leonoro kaj Joel konatiĝis okaze de la 5-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (2001) kaj uzas Esperanton kiel familian lingvon.



♥ Bård Hekland kaj Kristine Karlsøen geedziĝis la 30-an de la pasinta decembro en Bergen (Norvegio).

♥ Joost Witteveen (Nederlando) kaj Iliana Borisova (Bulgario) [vd. FE n-ro 39, p. 4], geedziĝis la 10-an de julio. Ili ekloĝis en Leiden (NL).

BONVENON

✿ La sepan de aprilo komencis sian viv-aventuron Yasna, filino de Tania kaj Pedro A.Hernández el Hispanio.

✿ La unua filo de James Rezende Piton kaj Isis Okabe Piton (Brazilo) naskiĝis la 13-an de majo. La knabeto nomiĝas Jean.

✿ La filino de Nikola kaj Martin Markarian (Germanio) naskiĝis la 25-an de majo. Ŝia nomo estas Linda Emily.

✿ Sabate, la 2-an de aŭgusto, matene precize je 6.00 naskiĝis la tria infano de István kaj Fabienne Ertl (Belgio), filo Dorián Félix .

20-a de novembro
INTERNACIA TAGO DE LA INFANRAJTOJ

Kiel la infanoj perceptas siajn rajtojn?
 Eble ili deziras tion komuniki al la plenaĝuloj per sloganoj, poemoj, prozaj
 tekstoj, desegnaĵoj aŭ eble per komponaĵoj!

Kunlaboru ankaŭ vi, ĉar ĉi internacia projekto rezultiĝos per du-lingva kolora
 publikaĵo kaj internacia ekspozicio.

Kroma programero: Internacia ekspozicio de porinfana gazetaro.

Pliajn detalojn petu de:
 Kroatia Esperantista Unuiĝo
 Sveti Duh 130
 HR-10000 Zagreb
 Kroatio
 rete: < hes@zg.hinet.hr >

DU DOMOJ JE VIA DISPONO

ESPERANTO-DOMO en Kostrena estas la ĉefa Esperanta ripozloko en **Kroatio**. Ĝi troviĝas en la plej bela marborda regiono apud Rijeka, 10 minutojn for de Golfo Žurkovo, kie komenciĝas la 4-km-longa promenejo apud la marbordo. Proksime al la E-domo troveblas tenisejo samkiel trim-vojo. Ne tro for de la domo estas bushaltejo n-ro 10, kunliganta Kostrena-n kun la urbo Rijeka en 20-minutaj intervaloj. La E-domo foras 7 km de la aŭtobusa kaj 10 km de la fervoja stacidomoj de Rijeka. La flughaveno Omišalj estas 25 km for sur la insulo Krk.

Eblas organizi restadon en la servo de plena pensiono, duonpensiono aŭ per kuireja memzorgado, same kiel semajnfinan restadon aŭ nur tranoktadon kun matenmanĝo.

La domo disponas pri:

teretaĝe: 3 dormejoj de 10, 3 kaj 2 litoj, manĝejo, kuirejo, duŝejo, necesejo; sur la 1-a etaĝo: 5 dormejoj de 2, 6, 8, 8 kaj 10 litoj, eta kuirejo, teraso, 3 duŝejoj, 2 necesejoj.

La domon posedas Esperanto-Societo de Rijeka kaj ĝia partnero en ties uzado estas Asocio de Skoltoj de Rijeka.

Por pliaj informoj kontaktu: <esperanto-ri@ri.tel.hr>;

fakso: +385-051 228 148.

ESPERANTA KONTAKTCENTRO Söjtör (Hungario)

Mallonga historieto de la EKO:

En majo 2001:

Post unu-du-jara korespondado kaj diskutado finfine la mondentreveno "e.on" principe akceptis nian peton transdoni la grandan konstruaĵon.

En julio 2001:

Dum SAT-kongreso en Nagykanizsa (HU) ni prezentis la eblon. Ĉirkaŭ 100 partoprenantoj vizitis la lokon. Dum la zagreba UK ni organizis forumon pri la utiligebleco de la ejoj. Postkongrese kelkaj vizitis la EK-on.

En decembro 2001:

Post la atingo de pli favoraj kondiĉoj dum la intertraktadoj nia asocio subskribis la interkonsenton, kaj la 31-an de decembro ni fariĝis posedantoj de la domego.

De januaro de 2002:

Ni febre agadas pri la funkciigo de la EKO. Nuntempe uzeblas 10 ejoj: Rondtablejo, bufedo, oficejo, vestejo, 3 banĉambroj, 3 dormoĉambroj (40 litoj). La celo estas utiligi ĉ. 100 ĉambrojn. En majo ni gastigis Junularan Esperantan Renkontigon (partoprenis ĝin 75 aliĝintoj).

En junio dum konsultiĝo en Rijeka denove estis traktate pri la utiligeblo de la grandega konstruaĵo.

Cetere Ŝojtoro situas en sudokcidenta parto de Hungario, je 40-kilometra distanco de la lago Balatono kaj de la aŭstria-slovenia-kroata landlimoj.

Ĝis la revido en EKO.

József Baksa

<baksaj@mail.dedasz.hu>



NI FUNEBRAS



Zsuzsa Csiszár (29.10.1951 - 8.9.2002)

Aparta estis Zsuzsa kaj aparta estas ŝia edzo Ernő. Ĉi tiu paro havis tiom brilan ideon, ke ĝi ankoraŭ estas sekvata, kiam ili du ne plu okupiĝas pri ĝi.

La geedzoj Csiszár estis ambaŭ instruistoj kaj krome ili amis infanojn, ne nur la siajn. Tie kuŝas la sekreto de la **RENKONTIĜOJ POR ESPERANTLINGVAJ FAMILIOJ, REF**, tra kiuj ĝoje pasis generacioj de infanoj dum la lastaj jardekoj. La REF-oj sukcesis, ĉar temis pri familioj, kiuj pretis doni sian atenton al infanoj kaj kunagi kun ili. Zsuzsa estis patrino tre amata, kiu kapablis disradii sian amon al ĉiuj, kaj kapablis agrabligi la restadon de la fremdaj familioj helpante pri ĉio, de la kuirado al la mastromado ĝenerala al la agado kun infanoj.

Mi kredas, ke ĉiuj, kiuj pasis tra REF-oj, restis komplete ŝokitaj, kiel mi, pro la informo pri ŝia morto en juna aĝo. Al la edzo kaj al la filinoj iras nia profunda kaj malĝoja sento de kundoloro.

Renato Corsetti

Laŭ: IPR 03/1

Niaj geamikoj s-ino **Symilde SCHENK LEDON** (Komitatano "A" ĉe UEA kaj ĉefdelegito por Brazilo, iama prezidanto de Brazila E-Ligo kaj prezidanto de E-Asocio de San-Paŭlo) kaj ŝia edzo, **Gilbert René LEDON**, aktiva SAT-peranto en Brazilo, la 3an de marto forpasis en aŭtomobilakcidento sur ŝoseo de la regiono, kie ili loĝis.

Tio estas grandega perdo, ne nur el la amika vidpunkto.

Ili estis treege gravaj por nia ŝtata, landa kaj kontinenta movadoj. Symilde estis la plej fidela disvastiganto de UEA en nia lando, absolute aktiva kaj celkonscia ĉefdelegito. Do ankaŭ en monda skalo la Esperanto-movado perdis!

Gilbert Ledon estis polemika homo kaj el filozofia vidpunkto li ofte diverĝis de mi kaj de pluraj el ni. Sed oni agnosku, ke li estis granda figuro de nia movado. Ili ambaŭ vivis kaj vivigis Esperanton ne nur (sed ankaŭ) en sia hejmo: ili redaktis, verkis, organizis de tute lokaj ĝis internaciaj aranĝoj kaj ilin partoprenis.

Ili estis de multaj jaroj regulaj partoprenantoj de SAT- kaj Universalaj Kongresoj.

Antaŭ la tragika akcidento ni eksciis, ke ĉambro en la tiam okazonta 51-a Renkontiĝo de Sudparaiba Valo en Caraguatatuba havos la nomon "Gilbert Ledon". Li, kiu estis kontraŭ la kulto al personeco, en E-Asocio de San-Paŭlo tiam ridoplene diris al ni: mi ne estas kontraŭ tiu omaĝo, sed mi ankoraŭ ne mortis! Ironie, la sorto volis, ke ne estu spaco por kritiko al li pro tiaj dumvivaj omaĝoj...

Dolore skribas,

James Rezende Piton



Unu el la verkoj de Gilbert R. Ledon, kiun li dediĉis jene:

Danke al mia familio:
 mia edzino - Symilde
 mia filino - Lilia
 mia filo - Marcel
 mia filino - Berenice

En la enkondukaj notoj staras:
 Eldono de la aŭtoro = Gilbert R. Ledon
 ankaŭ helpe al "Rondo Familia" de
 UEA
 - 1996 -

RAKONTU PRI VIAJ AVENTUROJ!

Post la reveno el vojaĝo ĉirkaŭ la mondo (15.7.2000 - 15.6.2002), petveture kaj per aliaj rimedoj, Rachel kaj David havas nun bildrakonton pri sia vojaĝo por prezenti al vi. La diapozitivoj, kiuj rakontas iliajn aventurojn kaj precipe iliajn renkontojn, estas ordigitaj laŭteme: la lernejoj, la religioj, profesioj, vivo de vojaĝantoj... kaj kompreneble Esperanto. Dilate ĉi-lastan ili provas montri, ke Esperanto estas vere ĉeestanta en la mondo kaj ke ĝi alportis multon al ili.

Rachel Prual, David Cholet; 34 bis, rue du Vieux Bourg, FR-85170
Dompierre/Yon; Francio
tel.: 0033-02-51 07 56 88
<http://mondepouce.free.fr>
turistoj@hotmail.com

El: La informilo 1/03

DESEGNIS POR NI... Vera Krivenko el Rusio



FAMILIE EN RUSIO

Diversgradaj porinfanaj aŭ porfamiliaj E-renkontiĝoj ekzistas jam de kelkaj jardekoj. Kutime ili okazas en centra kaj okcidenta Eŭropo. La unuan fojon mi partoprenis tiam en Hungario en 1983. Post tri jaroj ankaŭ ni sukcesis organizi en Samara, en la tiama Sovetunio, la unuan renkontiĝon de E-familioj. Kunvenis tie lingve spertaj familioj, kiuj vere deziris esperantigi siajn infanojn.

La sekva renkontiĝo okazis en 1988 apud Volgogrado kaj ĝi jam montris pozitivan evoluon, sed venis la Perestrojko – malaperis la familiaj E-renkontiĝoj.

En 2000 E-klubo en Ivanovo celebris sian 110-jariĝon. Pluraj ĝiaj anoj sukcesis tiam ne nur gepatriĝi, sed ankaŭ partopreni diversajn internaciajn E-renkontiĝojn. La akumulitaj spertoj donis ideon kunvenigi ne nur la “veteranojn” de nia movado, sed fari programon ankaŭ por la infanoj. Dum la lastaj 3 jaroj, en la komencaj tagoj de julio, en vilaĝo Ĉernci, 25 km de Ivanovo, ekfloris IvERo-j: Ivanovaj E-renkontiĝoj. Partoprenis ĝin adeptoj de la Internacia Lingvo el Rusio kaj Ukrainio, de la Blanka ĝis la Nigra Maroj. La programo celis diversaĝajn esperantistojn kaj infanojn, kiuj ĝuis la apartan programon. Pro la sufiĉe bona lingvonivelo de la plenkreskaj partoprenintoj kutime funkciis nur la kurso por tradukantoj. Aldoniĝis muzikaj vesperoj, gitar-koncertoj, sportaj konkuroj, kantado.

Kaj jen tio, kio meritas apartan mencion – la laboro kun infanoj. Laste (en 2003) kunvenis 1-ĝis18-jaruloj. Ilia gvidanto estis profesia pedagogo, helpata de studentino. L—a lingvokurson sekvis ne nur “niaj” infanoj, sed ankaŭ la infanaro el la vilaĝo Ĉernci faris siajn unuajn ligojpaŝojn. Krom E-kurso la porinfana programo enhavis ankaŭ ludojn, konkursojn, aŭkciojn, dancojn ktp. Pro sia aktivado dum la antaŭa tago la junaj IvERanoj ricevadis Imojn (IvERan Monon). Dufoje dum la restado oni povis uzi tiun monon dum aŭkcioj por aĉeti diversajn interesajn aĵojn. La profito de unu el la aŭkcioj estis transdonita al la direktoro de la internulejo, kiu gastigis nian renkontiĝon. La loĝantoj de la vilaĝo povis ĝui apartan prelego-koncerton.

La infanoj ĉiutage desegnis kaj pentris tion, kio estis la plej rimarkinda por ili en la antaŭa tago. Fine de la restado la verkoj - - ankaŭ skribaj, estis prezentitaj al la plenkreskuloj. Varman akcepton havis la teatraĵeto, preparita ankaŭ de la infanaro.

Iom da statistiko pri IvERo-3: 45 personoj el 12 loĝlokoj de du landoj (Ukrainio kaj Rusio). La plej juna partopreninto 1,5- jara, la plej aĝa 68-jara. En la renkontiĝo partoprenis 10 familioj kaj 14 infanoj.

Nome de la organizantoj invitas ĉiujn E-familiojn al IvERoj kaj esperas ricevi ideojn por la estontaj renkontiĝoj.

Tatjana Loskutova, Ivanovo (unu el la organizantoj de IvERoj); lota49@mail.ru

Peter Tau

ETERNA KOMENCANTO DE LA MONDA LINGVO

En 1939, Pedro, dekseksjara studento, forvadis de sia hejmurbeta en suda Ĉinujo tra longa distanco al la urbo Gvajjang en la sudokcidenta provinco de Gvaizhou, esperante ke li trovas sian patron kiu laboris tie. Malŝelice, Pedro ne trovis sian patron kaj li devis vivi sola en fremda urbo ĉar lia hejmurbeta estis okupita de armeoj el Japanujo dum la japana invado de Ĉinujo ekde 1937.

lutage Pedro vidis publikan anoncon de nova klaso de Esperanto (Monda Lingvo en la ĉina) en publika biblioteko. "Monda lingvo? Kia lingvo ĝi estas?" li scivolis; "Ĉu Esperanto estas uzata en ĉiuj landoj en la mondo?" Li ĉeestis la unuan lecionon iuvespere kaj tuj interesiĝis pri la lernado de la monda lingvo. Bedaŭrinde la kurso devis esti ĉesigita, ĉar la juna instruisto el Koreujo foriris por milita partopreno kontraŭ la japanaj armeoj.

Post tri semajnoj de lernado de Esperanto, Pedro jam povis legi simplajn legaĵojn en la monda lingvo. Li trovis Esperantan ĵurnalon en la urba biblioteko, kiun li povis legi per la helpo de Esperanto-ĉina vortaro. Al li plaĉis mallonga artikolo pri la temo de populareco. Li tion tradukis en la ĉinan kaj sendis al la redaktoro de ĉina ĵurnalo en la urbo. Post du tagoj Pedro ĝojege legis sian tradukitan artikolon publikitan en la ĵurnalo. Kiel ekscitita li estis, vidante sian nomon kiel aŭtoro, aperintan en la ĵurnalo!

Lia intereso pri Esperanto altiĝis, sed li ne trovis ŝancon por lernado de la monda lingvo la sekvantajn deksep jarojn ĉar li devi vagi el urbo al urbo en kelkaj provincoj en Ĉinujo por vivtenado kiel juna vagulo.

En novembro 1955 bonŝanco alvenis al Pedro kiam li ricevis la neatenditan inviton de Luther-Kolegio en Usono, ke li envenu en la kolejon kiel fremda studento subtenota per bona stipendio. Li vojaĝis per ŝipo el Hongkong al San Francisco. La 5-an de decembro la ŝipo atingis Honolulu, Havajon kaj la pasaĝeroj povis viziti Honolulu dum kelkaj horoj. Pedro foriris el la ŝipo al la urbo promene en la stratoj. Pasante la urban bibliotekon li vidis longan talon sur la pordo en kiu estis la vortoj 'Esperanto-Ekspozicio'. Tuj kiam li envenis en la bibliotekon, li estis bonvenigita de afabla viro, kiu gvidis lin en salonon, kie estis multaj Esperantaj libroj kaj gazetoj.

"Mi lernis Esperanton en Ĉinujo antaŭ multaj jaroj," Pedro diris en simpla Esperanto la unuan fojon en sia vivo. Tio ĝojigis la afablan viron - inĝenieron. Eksciante, ke Pedro estas turisto, li proponis konduki Pedron en sia aŭto por viziti pejzaĝajn vidojn. Li ankaŭ akompanis Pedron viziti katolikajn preĝejon, kie Pedro estis prezentita al maljuna sacerdoto, gvidanto de la loka Esperanto-Asocio. Li donacis al Pedro ekzempleron de la libro "Esperanto, Grammar&Commentary" kompilita de George Cox. La sacerdoto skribis sur blankan paĝon: "Al mia nova amiko, Pedro, de havaĵa amiko, frato Charles Cummingsmith, la 5-an de decembro, 1955". Je sia alveno en Luther-Kolejon en Iova, Usono, Pedro estis pli surprizata, ke frato Cummingsmith jam sendis al li donacon de tridek usonaj dolaroj por aĉeto de libroj en la kolegio.

Dum la du jaroj (1956-57) kiam Pedro vivis en Usono, li ne havis ŝancon lerni Esperanton, sed en 1959 kiam li estis studento en Kanado, li ricevis ekzemplerojn de Dia Regno, Esperanta gazeto publikigita de KELI (Kristana E-Ligo Internacia), kiuj lin multe interesis.

En decembro de 1959 Pedro vojaĝis el Kanado al usona urbo Dallas en la suda ŝtato Teksaso per aŭtobuso. Alveninte li volis iomete ripozi en la atendejo de la stacidomo. Sed neatendite leviĝis problemo: li vidis du atendejojn, unu por blankaj kaj alian por nigraj homoj. "Kiun atendejon mi devas eniri? Mi estas nek blankulo, nek nigro!" - Pedro sin demandis. Subite li memoris, ke en la membro-listo de KELI li trovis la nomon de profesoro en universitato en Dallas. Li telefonis al la profesoro kaj petis lin pri konsilo dirante: "Profesoro, mi estas ĉina turisto kaj komencanto de Esperanto, ĵus alveninta en Dallas. Kiun atendejon de la stacidomo mi devas eniri: ĉu tiun por la blankuloj aŭ tiun por la nigroloj?" Post momenta paŭzo la profesoro respondis: "Laŭ mia opinio vi povas eniri unu aŭ la alian laŭ via plaĉo."

Kvindek jaroj pasis de kiam Pedro komencis lerni Esperanton en 1939, sed ĝis 1990 li ankoraŭ ne havis ŝancon lerni pli progresigajn lecionojn de la monda lingvo. En 1990 la Universala Kongreso de Esperanto okazis en Kubo, kiam Pedro estis loĝanta en Gvajano, malgranda lando en Sudameriko. Li volis vojaĝi al Kubo por ĉeesti la UK-n, sed li ne povis havigi vizon por eniri la landon tiujare.

Oni parolas la anglan en Gvajano, sed en ĝiaj najbaraj landoj oni parolas la hispanan en Venezuelo, la Portugalan en Brazilo kaj la nederlandan en Surinamo. La deziro uzi ian internacian lingvon en ĉiuj landoj devas esti sopiro de la guajananoj, sed dum la multaj jaroj kiam Pedro vivis en Gvajano, li neniam renkontis iun, kiu scipovis Esperanton. Leviĝis do en lia kapo la penso: "Mi estas nun tre maljuna. Por kio

mi ankoraŭ interesiĝas lerni Esperanton? Ĉu Esperanto estas ankoraŭ utila por sepdek-jara oldulo? Mi ne havas ŝancon viziti fremdajn landojn kiam mi fariĝos malforta aŭ kiam mankos al mi mono. Al mi mankas ankaŭ la volo por skribi multajn leterojn al nekonataj amikoj per Esperanto pri diversaj temoj." En 1992 Pedro estis la sola UEA-membro loĝanta en Gvajano. "Por kio mi ankoraŭ pagas membro-koston en usonaj dolaroj al UEA?" li sin demandis kaj poste ĉesigis sian membrecon en UEA.

Sed li ĝuis legi kelkajn romanojn tradukitajn en Esperanto el diversaj lingvoj, kiaj ekzemple: *La unua amo* (el la rusa), *Fulmotondro* (el la ĉina), *La malica komizo* (el la hispana), *La vojo de serpento sur oko* (el la sveda). Per Esperanto li povas ĝui la literaturon kaj kulturon de multaj landoj. Li legis en la revuo Esperanto de UEA (marto 1996), ke itala aŭtoro de romanoj Corrado Tavanti (1919-1995) lernis Esperanton kiel emerito kaj verkis tre bonajn verkojn. Subite fulmis en lia kapo la ideo: "Ĉĉ mi povus tion fari, se mi lernos pli bone la mondan lingvon".

Komprene, ke la Esperanto-movado kreskas kaj grandiĝas nur kiam pli kaj pli multaj kredantoj, junaj kaj maljunaj, de la idealo de Zamenhof subtenas la Universalan E-Asocion, Pedro decidis remembriĝi al UEA por la nova jaro 2003, kvankam li ankoraŭ neniam renkontis esperantiston en Gvajano en la pasintaj dek sep jaroj (1986-2002). Li sentas nun, ke Esperanto jam grandigas lian mondon kaj varmigas lian koron per sia riĉa kaj bela literaturo. Ĉĉ vivante sola en sia domo, Pedro sentas varman amikecon de esperantistoj en multaj landoj.

La deksesjara komencanto de Esperanto en 1939 estas nun okdekjara oldulo, kiu estas ankoraŭ komencanto de la Monda Lingvo, kaj ne scipovas paroli Esperante pro manko de kontaktoj kun esperantistoj, sed en lia koro Esperanto estas utila por li kaj la Monda Lingvo, Esperanto, vivos eterne.



D-ro Peter Tau, matematikisto el Gvajano

Gesamideanoj,

Ĉi-sube mi dissendas alvokon de mia instituto por partopreni en la Esperanta fabelkonkurso, kiu ĉi-jare okazos por la kvara fojo. Pasintjare la Esperanto-branĉo ricevis tre malmulte da konkursaĵoj, sed malgraŭ tio ni decidis reokazigi ĝin ankoraŭ unufoje.

Kiel esperantisto mi esperas, ke ĉi-jare la nombro estos pli granda, por ke Esperanto restu konkurso ankaŭ en estonteco. Tio dependas de la aktiveco de esperantistoj mem, kiuj espereble komprenas, ke Esperanta branĉo en prestiĝa konkurso de ekstermovada instituto kontribuas al la prestiĝo de Esperanto.

Mi dankas ĉiujn, kiuj kunlaboros!

Osmo Buller

INVITO AL ESPERANTA FABELKONKURSO

Päätaalo-instituto estas kultura-literatura centro en Taivalkoski, Norda Finnlando, nomita laŭ Kalle Päätaalo (1919-2000), eminenta verkisto naskiĝinta en Taivalkoski. Ĝia direktoro estas Osmo Buller. Inter ĝiaj agadoj estas fabelkonkurso por finnaj infanoj ĉiujare ekde 1993, la plej prestiĝa tia konkurso en Finnlando.

En 2000 oni aldonis al la konkurso Esperanton laŭ iniciato de la Vilaĝa Asocio de Metsäkylä, vilaĝo en la municipo Taivalkoski. Ankaŭ ĉi-jare la instituto invitas konkursi en Esperanto.

Estas tri kategorioj: infanoj ĝis 9-jaraj; 10-11-jaraj kaj 12-13-jaraj.

La konkursaĵoj estu verkitaj originale en Esperanto de individuaj infanoj aŭ de grupoj (ekz. lernejaj klasoj). Individuaj kaj grupaj konkursaĵoj estos taksitaj aparte.

Longeco ne estas fiksita. En la skribado aŭ tajpado plenkreskulo rajtas helpi laŭ sia konscienco. En la prijuĝado oni aprezas antaŭ ĉio fabelecon kaj originalecon.

La konkursaĵoj estu senditaj poŝte kaj alvenu plej laste la 15-an de septembro 2003 je la adreso:

Päätaalo-Instituto, Fabelkonkurso, PL 39, FI-93401 Taivalkoski, Finnlando

Oni uzu pseŭdonimon kaj menciu, ĉu temas pri grupo aŭ unuopulo. La nomo, adreso, naskiĝdato kaj (se eble) telefonnumero aŭ retadreso de la konkursanto estu en aparta koverto.

La rezultojn oni publikigos samtempe kun tiuj de la finna konkurso la 18-an de oktobro, kiam oni festas la nomtagon de Satu (nomo, kiu en la finna signifas fabelon). En ĉiu branĉo oni principe aljuĝos tri premiojn. Inter la gajnintoj de la unua premio la ĵurio elektos la laŭreaton de la ĉefpremio, Fabelo Internacia.

Pli da informoj donas la komisiito pri la konkurso:

S-ino Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando

Rete: aini.vaaraniemi@pp.inet.fi

Fabeloj, premiitaj en antaŭaj jaroj, estas legeblaj en:

www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto.htm

ENHAVO

2. Editora angulo
- 2.-3. Esperanta familio en FE
(M. Brandenburg)
4. Lingva angulo
5. Iru ni al...
6. Kriza momento (T. Steele)
7. Tapori
8. Librobreto
- 8.-9. Kion legi? Konsilas Abir
10. El la familiaj albumoj
11. La 19-a IF, IIK 2003
12. Humuro. Korespondi deziras
13. Novaj paroj
Bonvenon!
14. Internacia tago de la infanrajtoj
- 14.-15. Du domoj je via dispono
- 16.-17. Ni funebras
18. Rakontu pri viaj aventuroj!
Desegnis por ni (V. Krivenko)
19. Familio en Rusio (T. Loskutova)
- 20.-21. Eterna komencanto de la
monda lingvo (P. Tau)
22. Invito al Esperanta fabelkonkurso
(O. Buller)
23. Enhavo. Fotoj.
Amo (G. Herbert)
24. Gingko (M. Mckay)

FOTOJ:

Titolpaĝe:

- supre: La familio Sagbadjelou el Togolando la 3-an de jan. 2003
- malsupre: Probal Daŝgupta kun sia filo Abir en 2002 (fotis G. Rao)



AMO

Am' bonvenigis; la anim' retiris,
Polva, pek-makulata.
Vidante min, post kiam mi eniris,
Heziti, Amo gvata
Pliprosimiĝis, dolĉe demandanta
Ĉu io estas mankanta.

Respondis mi, "Gast' , digna
ĉeestulo".

Am': "Mi gastigos vin".
"Mi, kruda kaj sendanka? Mi,
karulo,

Ne povas rigardi cin".
Manpremis Am' , kaj faris dolĉan
ridon:

"Ĉu vi donis la vidon?"

"Prave; sed mi difektis; honto mia
foriru kiel kulpano."

Am' diras, "Kiun ŝarĝis kulpo via?"
"Mi estu la servanto".

Sidiĝu, ĉar la manĝon mi aranĝis.
Do sidis mi kaj manĝis.

George Herbert (1593-1633)
Esperantigis Michael Cayley
El: *Dia regno n-ro 3/2002*

**Ĝenie mi trovas iun,
kiu estas pli kara ol mia memo.
Tiel same, ankaŭ por aliuloj
lia aŭ ŝia memo estas kara.
Tial ne atencu aliulojn
por ami la memon.**

(**Samjutta-Rikaja**)

El: **La Japana Budhano n-ro 317**

LA FOLIO DE TIU ĈI ARBO EL ORIENTO MALVUALIGOS MULTAJN SEKRETOJN.
(J.W.GOETHE, "GINGKO BILOBA")

GINGKO (Gingko biloba)

Se oni kredas la geologojn, aperis homo, kiel ni konas lin,
antaŭ du milionoj da jaroj.

Visis dinosaŭroj antaŭ ducent dudek milionoj da jaroj.

Aperis insektoj antaŭ tricent dudek milionoj da jaroj.

Ĝkaperis la ginko antaŭ tricent kvindek milionoj da jaroj dum la gigantaj ekvizetoj
(angle: *horsetails*) ankaŭ kreskis, poste farante karbon.

La ginko hodiaŭ vivas en multaj landoj, plantite, sed preferas varmajn somerojn,
kiel en Ĉinio sudorienta, kie ĝi estis trovita nature, neplantita.


Ĝi havas strangajn foliojn dulobajn (do, *biloba*) kiel ventumilo kaj similajn
al la folioj de la filiko adianto (angle: *maidenhair fern*), do la angla nomo
de la arbo estas 'maidenhair tree'.

Ĝi povas vivi dum mil jaroj en hejma Ĉinio, sed kreskas plirapide
kaj mortas pli frue ĉi tie.

La plej interesa afero estas ke, ĉar ĝi evoluis antaŭ eĉ insektoj,
nek besto nek animalo nek insekto formanĝas la foliojn.

En medikamentaĵo ginko estas uzata por helpi memorkapablon kaj koncentradon,
kaj kontraŭ alergioj kaj inflamo.

Maire Mckay



**Ĉiu ricevanto de FAMILIA ESPERANTO
povas libervole kontribui al UEA-konto
de RF: idoj-P**

REDAKTAS: Katarína Bodnárová, CO de UEA,
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
<cind@co.uea.org>